LVP

**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 27/1973 7 nov 1973
Aperas ĉiusemajne

30a Internacia Junulara
Konferenco 1974
Münster FRG

30. IJK 1974

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Glumarkoj dukoloraj
1 folio kun 9 glumarkoj
-,50 GM + -,25 afranko

## GEA-estraraj kunsidoj

Lüdenscheid (pp/hn) Kiel kutime tre ampleksa tagordo okupis la estraron de GEA dum sia kunsido en Lüdenscheid la 3an kaj 4an de novembro.

La administraj problemoj, inter kiuj la novaj kotizoj kaj la buĝeto 1974 elstaris, ne postulis longan tempon en komparo kun la diskutado kaj decidofaro pri novaj aktivecoj aŭ daŭrigo de jam kurantaj. La popularigo de Esperanto per vasta informado en la publiko estas unuaranga tasko. La eldonado de tri diversaj broŝuroj servu al ĝia efektivigo, donu krome la materialon por intense informi en politikistaj kaj sciencistaj rondoj. Ankaŭ la disponigo de ekspozicia materialo kaj enbuĝetigo de monsumo por la subtenado de partopreno en ekspozicioj apartenas al ĉi tiu programo. Gravege estas la aktivado ĉe parlamentanoj, ne nur fare de la estraro (nova paŝo post pretigo de la koncerna broŝuro), sed ankaŭ per aktiveco de la membroj en grupoj kaj ligoj, eĉ individuaj, ekz. intervjuante antaŭ balotoj la kandidatojn pri ilia sinteno al Esperanto.

La partopreno de esperantistoj en la preparado kaj poste en la vivigo de ĝemeliĝoj inter diversnaciaj urboj estas sukcespromesa tereno. Ĉar en 1974 ne okazos germana Esperanto-kongreso, la estraro rekomendas la aranĝon de printempaj ligotagoj en inda, varbefika kadro. Ili povus stari sub la temo, kiu verŝajne ankaŭ estos tiu de la UK Hamburg: Esperanto en la tria mondo.

GEA subskribis la konvencion pri la Eŭropa Esperanto-Centro kaj resendis la koncernan dokumenton al la administrantino de EEC.

Je la fino ni publikigas la tabelon de novaj GEA-kotizoj validaj ekde la 1 jan 1974:

| Kategorio, mem fiksenda de ĉiu membro | Jara kotizo: Individuaj membroj | Jara kotizo: *Grupaj membroj reduktita kotizo |
|---|---|---|
| Ia Personoj sen propra enspezo (infanoj, lernantoj, studentoj) | 18,-- GM | 14,40 GM |
| Ib Familianoj (sen Revuo) | 18,-- GM | 14,40 GM |
| II Personoj kun enspezoj sub 1000 GM | 24,-- GM | 19,20 GM |
| III " " " inter 1000 kaj 1500 | 36,-- GM | 28,80 GM |
| IV " " " " 1500 kaj 2000 | 48,-- GM | 38,40 GM |
| V " " " super 2000 GM | 60,-- GM | 48,-- GM |

* La kotizparto de 20 % por la grupoj servu al iliaj propraj bezonoj. La grupoj estas liberaj en la fiksado de pli altaj kromkotizoj.

**********

## Ĉu vi volas esti la 16a?

Jam 15 esperantistoj gajnis la ĉefpremion en konkursoj de Pola Radio. Se vi volas esti la 16a, kiu ĝuos dektagan rondvojaĝon tra Pollando, partoprenu en la nova konkurso. Detalojn legu en la anonco sur la lasta paĝo!

Pola Radio eldonis novan programfolion en Esperanto por la elsendosezono Novembro 1973 - Majo 1974. Petu vian ekzempleron ĉe Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Leterkesto 46, PL-00 950 Varsovio.

30a INTERNACIA JUNULARA KONFERENCO
30. INTERNATIONALE JUGENDKONFERENZ
DES WELTVERBANDS JUNGER ESPERANTISTEN 4.-10. AUGUST 1974
LKK/VORBEREITUNGSAUSSCHUSS: D-44 MÜNSTER, MONDSTRASSE 3
TELEFON: (02504) 7113 UND (02551) 3840 - TELEX 971536

30. IJK 1974

JUNULARO kaj EDUKADO

Novaĵoj pri la 30a IJK de TEJO

Münster (pp) La ĉiujara somera aranĝo de TEJO ĉifoje prezentas sin sub alia nomo: la titolo "konferenco" sekvas la tendencon de TEJO-kongresoj al pli serioza kaj faka laboro, atentata ankaŭ en neesperantista publiko. Sed ĝi ne signifas ke la organizantoj de la 30a Internacia Junulara Konferenco (IJK), okazonta de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 1974 en la nordokcidentgermana urbo Münster, forgesis la gravecon de la IJK kiel plej grava internacia renkontiĝo de la esperantista junularo.

La loko de tiu renkontiĝo estas universitata urbo situanta 290 km sudokcidente de Hamburgo. Ĝi havas 200.000 enloĝantojn, inter ili 30.000 studentojn. Krom la kutima pluvo kaj la bone konservita historio (ekzemple estis Münster, kie finiĝis la 30jara milito kaj naskiĝis libera Nederlando) karakterizas ĝin 28 preĝejoj en la urbocentro, multaj administracioj, parkoj kaj nekopieblaj drinkejoj.

Inter la studentoj troviĝas grupeto da esperantistoj, kiu decidis helpi al Germana Esperanto-Junularo el ĝia embaraso, kiun kaŭzis la neceso organizi la 30an IJK.

Sub la temo "Junularo kaj Edukado" la konferenco traktos problemojn de altlerneja reformo, de profesia instruado, de lingvoinstruado kaj celoj de eduka politiko. Al la programo apartenos seminario pri la rilatoj inter lingvo kaj politiko same kiel la kutimaj eroj: balo, akceptoj, kulturaĵoj, ekskurso kun folklora akcento kaj laborkunsidoj de TEJO.

La partoprenantoj loĝos en modernaj domoj, plejparte en individuaj ĉambroj kun plena komforto. Malgraŭ tio la kotizoj restis moderaj: ili varias inter 75 kaj 140 germanaj markoj (DM), depende de aĝo, aliĝdato kaj TEJO-membreco. Tiu kotizo inkluzivas ĉion.

Por profiti de pli malaltaj kostoj, kaj ankaŭ ĉar la nombro de lokoj ne estas senfina, estas preferinde aliĝi laŭeble frue. Petu la informfolion ĉe: 30a IJK, p.a. Gisela Jungkamp, D-44 Münster, Mondstr. 3, FRG.

**************

Sukcesa Esperanto-Tago

Nürnberg (pp) La Esperanto-Tago de "malfermita pordo" en Nürnberg la 4an de novembro 1973 plenumis ĉiujn atendojn. Pli ol 70 personoj, interesuloj kaj esperantistoj, rigardis la inform- kaj literaturekspozicion kaj ĉeestis la kunvenojn. Interesuloj aĉetis lernolibrojn, partoprenantoj de Esperanto-kurso pli detale informiĝis pri Esperanto, nordbavaraj esperantistoj el Kronach, Lichtenfels, Bamberg, Würzburg, Weiden, Ansbach, Fürth, Kitzingen kaj Nürnberg diskutis pri regionaj problemoj kaj decidis aranĝi printempan kunvenon kun novelektoj en Weiden aŭ Würzburg. Alexander Starke rakontis el sia Esperanto-vivo dum 50 jaroj. Ĉeestis gastoj el aliaj urboj, i.a. el Augsburg. Oni aĉetis Esperanto-literaturon.

Aûstralio hodiaû en Aûstria Televizio

Vieno (pp) Eble por la unua fojo en la historio de Esperanto filmo en Esperanto estas montrata en nacia Televizio. Temas pri la esperantlingva filmo "Aûstralio hodiaû", kiun montras la aûstria televizio F S 2, la dua programo de ORF, en la kadro de la t.n. foira programo ĵaûde, la 8 nov 1973, je la 13a horo. La filmo daûras 24 minutojn. Tiun unikan sukceson atingis Aûstria Esperantista Federacio.

Svisa Radio respondas

Berno (pp) La Esperanto-fako de Svisa Radio, Kurtonda servo, respondas al korespondaĵoj de siaj aûskultantoj en siaj elsendoj de la 7 resp. 10 nov, 14 resp. 17 nov, 21 resp. 24 nov, 28 nov resp 1 dec, 5 dec resp 8 dec.

La Esperanto-fako de Svisa Radio entute ricevis leterojn kaj poŝtkartojn el Aûstralio, Aûstrio, Brazilo, Britio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario, Italio, Jugoslavio, Kanado, Kubo, Nederlando, Norvegio, Nov-Zelando, Pollando, Svedio, Svislando kaj Usono.
Aûskultantoj povas ricevi programkajerojn de la kurtonda servo de Svisa Radio, sur kies paĝoj 2, 10 kaj 12 oni trovas sciigojn pri la Esperanto-programo. Skribu al: Svisa Radio, Kurtonda Servo, Esperanto-Fako, Giacomettistr. 1, CH-3000 Bern 16.

Homoj kaj Nomoj
kun kaj sen Renomoj

Ralf Dahrendorf, unu el la du FRG-komisaroj en la EK-komisiono en Bruselo deklaris sin ne-adepto de Esperanto, sed pretas interparoli pri Esperanto kun Uwe Joachim Moritz, vicprezidanto kaj estrarano pri eûropaj aferoj de GEA.

Urba parlamentano Müller, Offenbach, prezidanto de la unuiĝo por la popola altlernejo, laû propono de esperantisto Denk dum la membrokunveno de tiu unuiĝo proponos al la urba administracio eknomi loĝstraton laû "Esperanto" aû laû D-ro Zamenhof. Dum la sama kunveno oni instigis daûre okazigi Esperanto-kursojn kaj peti la ĝemeliĝajn urbojn de Offenbach, sekvi tiun ekzemplon. La nunan Esperanto-kurson, gvidata de Robert Kvasnak, usondevena studento kaj unu el la aktivuloj en la ROMOLO-regiono, partoprenas 14 personoj.

Hugo Röllinger, estro de la Esperanto-grupo Bad Kissingen, havos prusan-bavaran dialogon kun Hildegard Stolpe pri la monda banloko Bad Kissingen la 12an de nov. en Berlino.

Werner Heinrich, Berlino, daûrigos siajn per-antenajn sonbendajn registraĵojn, ĉefe el Pola Radio, pri la Universala Kongreso de Esperanto en Beogrado kaj aliaj interesaj kaptaĵoj la 13 nov 1973.

Andreas Tôru Zeilinger, Fürth, 2 1/2-jara, estis la plej juna partoprenanto en la Esperanto-Tago de Nürnberg. Li parolas japane, Esperante kaj germane.
Radio ROMO elsendis en sia dimanĉa programo de la 4 nov 1973 la sonbendon, sur kiu Ludwig Robel, Kronach, intervjuas Antal Münnich, fakulo pri komputiko el Budapeŝto. La tekston de la intervjuo Pilo-Press jam publikigis.

Radio Varsovio revas pri "radiaj folioj". Aûskultanto proponis eldoni regulan bultenon por aûskultantoj de Esperanto-elsendoj. Kion opinias la legantoj de Pilo-Press?

Anton Oberndorfer, konata junulara aganto en Aûstrio, kaj Herta Kreisbichler geedziĝos la 17 nov 1973 je la 10,30 h, en nacia kostumo. Adreso: A-4600 Wels, Ferd. Wiesingerstr. 15

P O L S K I E  R A D I O
W a r s z a w a

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Multaj premioj kaj objektaj donacoj

En konkurso de la Pola Radio, anoncita por la eksterlandaj aŭskultantoj okaze de la Jartrideko de Popola Pollando.

Al partopreno en la lotado de la premioj rajtigas respondo almenaŭ al unu el la subaj demandoj:

1) Kiujn atingaĵojn de Pollando / sociajn, ekonomiajn, kulturajn ktp./ en la periodo de la 30 lastaj jaroj vi opinias la plej interesaj?

2) Pri kio karakteriza: nomo, evento, fenomeno, objekto ktp. - vi ekpensas lige kun Pollando?

3) Kiujn establejojn projektitajn aŭ konstruitajn de poloj en via lando aŭ en la mondo vi konas?

La respondojn ni petas sendi laŭ adreso: Polskie Radio, 00-950 Warszawa, P.O. Box 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso" ĝis la 31 de decembro 1973 j. / decidas la dato de la poŝta stampo/.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj en la disaŭdigoj emisiotaj la 31-an de januaro 1974 j.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

Partoprenu mem kaj partoprenigu aliajn.

Ni deziras al vi bonŝancon!

Polskie Radio